Dido

Por samtitola artikolo vidu la paĝon Dido (apartigilo).

Dido aŭ **dodo** (*Raphus cucullatus*) estas formortinta, neflugkapabla birdo, vivinta sur insulo Maŭricio ĝis la fino de la 17-a jarcento.

Ĝi estas unu el la tri specoj, formantaj la familion didedoj (*Raphidae* aŭ Rafedoj). Oni listigas la dido-familion en la sistematiko plej ofte al ordo de la kolomboformoj (*Columbiformes*), sed malofte oni apartigas ĝin al memstara ordo (*Raphiformes*). La du aliaj specioj estis – vivintaj simile sur insuloj de la Hinda Oceano - du ermitkolomboj (*R. solitarius* kaj *Pezophaps solitaria*).

La birdojn ekrigardis (kaj notis pri tio) unuafoje portugalaj maristoj en ĉirkaŭ 1507 kaj dum 2 jarcentoj ekstermis la birdon la homoj kaj la kunportitaj hejmaj bestoj. La dido formortis en 1681, la reunia ermitkolombo en 1746, la rodriguesa ermitkolombo en ĉirkaŭ 1790.

La dido estis pli granda ol meleagro, ĉirkaŭ 23 kg. La plumaro estis blugriza, la kapo granda, la beko nigra, hoka, kun ruĝeta kovraĵo. La flugilo estis eta, senutila, la kruro estas dika, flava kaj pugopinte, starante plumvosto.

La Reunia ermitkolombo estis blanka versio de dido. La bruna Rodrigesa ermitkolombo estis pli alta kaj maldika, kun pli malgranda kapo, senhoka beko.

Ĉiu restaĵo de dido estas kapo kaj kruro en Oksfordo, kruro en la British Museum, kapo en Kopenhago kaj pliaj en diversaj muzeoj. Oni trovis pluajn ostojn dum la jaro 2006.

Ĝi estis simbolo de la senbrida homa agado kontraŭ la medio, formorto de specioj.

Etimologio

Dido

Troveblo de fosilioj: Moderna

Rekonstruita dido ĉe Muzeo de Natura Historio de universitato Oksfordo.

Biologia klasado

Regno:	Animaloj *Animalia*
Filumo:	Ĥorduloj *Chordata*
Klaso:	Birdoj *Aves*
Ordo:	Kolomboformaj *Columbiformes*
Familio:	Kolombedoj *Columbidae*
Subfamilio:	Rafedoj *Raphinae*
Genro:	***Raphus*** Brisson, 1760
Specio:	***R. cucullatus***

Dunomo

Raphus cucullatus
(Linnaeus, 1758)

Konserva statuso

Konserva statuso: Formortinta (frua 17-a jarcento)

La esperanta vortformo **dido**, uzata anstataŭ la pli internacia formo **dodo**, devenas de latina sinonimo ***Didus ineptus*** (Linnaeus, 1766), uzata nur en la 18-a jarcento.

Antaŭa vivloko (ruĝa)

Aliaj Vikimediaj projektoj

Vidu ankaŭ

- Dodo (biero)
- Maskarenaj arbaroj

Eksteraj ligiloj

- The Dodo Cartoon Blog (http://dodocartoon.pagesperso-orange.fr/)
- foto-grupo "Didus Ineptus" ĉe Flickr.com (http://www.flickr.com/groups/didusineptus/)

Bildaro

La aventuroj de Alicio en Mirlando, Ilustraĵo de John Tenniel (1865)

Ĉi tiu 1651 bildo de dido de Jan Savery estas bazita de 1626 pentraĵo de Roelant Savery, farita de konservita kaj remburita specimeno. Notu ke ĝi havas du maldekstrajn krurojn kaj la birdo estas trodika de domeco

Dido de Surat, verŝajne de Ustad Mansur, miniaturo, ĉirkaŭ 1625

Kapo de dido, detalo de ilustraĵo el *Atlas de Zoologie*, Paul Gervais, 1844

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dido&oldid=6473867"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 08:41, 27 nov. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.